



Ĉapitro 12

Kio okazas?

Enkonduko.....	2
Parto 1 - Vekiĝo.....	2
Parto 2 - Planado.....	5
Parto 3 - Rabistoj.....	8
Parto 4 - La fuĝo.....	11
Parto 5 - Konatiĝo.....	14
Parto 6 - Ne pafu!.....	17
Parto 7 - Ĉu vere?.....	20
Parto 8 - Rozo.....	23

Enkonduko/ Introduction

Dank' al tio ke en ĉi tiu ĉapitro estas multaj bildeto kiuj ilustras la rakonton vi espereble komprenos ĝin sen grandaj problemoj.

Se vi havos iun demandon aŭ komenton, vi ĉiam estas bonvena skribi al libera@ikso.net.

With the many pictures illustrating this chapter, you will hopefully understand it without any major problems.

If you have any questions or comments, you are always welcome to write to libera@ikso.net.

Parto 1 - Vekiĝo



Ĝon dormas... Kioma horo estas? Jam estas la naŭa horo kaj dudek minutoj.



Lana, kunloĝanto kaj amiko de Ĝon, estas ĉe la komputilo kaj legas retroŝton. "Baldaŭ devus Ĝon vekigi" ŝi pensas.

La vekhorloĝo apud la lito de Ĝon eksonoras. Ĉu Ĝon vekigis? Ĉu la vekhorloĝo vekas lin? Ne, ĝi ne vekas



lin. Ĝon ne vekigis. Ĝon profunde dormas!



Lana ne komprenas kial Ĝon ne aperas... "Ĉu li daŭre dormas?", pensas Lana kaj rigardas sian horloĝon. Kioma horo estas? Nun estas la naŭa kaj kvardek kvin minutoj.



Lana frapas la pordon de Ĝon. Sed venas neniu reago. "Ĉu vi estas veka?", demandas Lana ĉe la pordo. Ne venas respondo... Tamen, Lana pensas ke ŝi aŭdas la vekhorloĝon de Ĝon.



"Kion fari? Mi devas iri en la ĉambron kaj rigardi kio okazas.", diras Lana al si mem kaj malfermas la pordon de la ĉambro de Ĝon.



La vekhorloĝo sonoras... Ĝon dormas... Lana miras!
"Ĝon, Ĝon, vekigu! Vi devas vekigi nun!" provadas
Lana. Sed ŝi ne sukcesas veki sian amikon. Ĝon
dormas tre profunde!



"Kion fari?", cerbumas Lana. Post sekundeto ŝi
ekhavas ideon kiel veki sian tre dormeman amikon kaj
eliras el la ĉambro. "Nun mi scias kiel eldormigi vin.",
ŝi flustras kun ridetaĉo.



Kiam Lana revenas ŝi havas glason da malvarma akvo
en sia mano. "Baldaŭ vi certe estos tute veka!", ŝi diras
kun ŝercema vizaĝo.

Parto 2 - Planado



Lana sidas kaj legas gazeton ĉe la kuireja tablo kaj kontentas pri sia vek-ideo. Ĝon eniras la kuirejon.

Lana: -Finfine, bonan matenon Ĝon!

Ĝon: -Bonan... Mi havis tre strangan sonĝon ĉi-nokte.

Lana: -Ĉu vere, pri kio?

Ĝon: -Momenton, mi devas pensi.

Lana: -Bone, prenu vian tempon, mi kuiras kaĉon dume.



Ĝon: -Mmmm, bonega kaĉo. Vere bongusta!

Lana: -Dankon. Jen, prenu iom da soja lakto ankaŭ.

Ĝon: -Soja lakto, ĉu vi pensas ke mi estas vegano?! Ne dankon, mi preferas veran lakton.

Lana: -Bone bone. Do, pri kio vi sonĝis?

Ĝon: -Ha, jes, temis pri nia nova aŭto, kiom belega ĝi estis en mia sonĝo!

Lana: -Nia aŭto! Ni ja ankoraŭ ne aĉetis ĝin.



Ĝon: -Vi pravus, sed post kelkaj tagoj ni faros, ĉu ne?

Lana: -Jes, espereble. Nur ni devas aranĝi la paperojn ĉe la banko.

Ĝon: -Tion ni povus fari hodiaŭ, almenaŭ mi ne havas ion alian gravan por fari.

Lana: -Mi konsentas. Iru ni al la banko tuj post la matenmanĝo.

Ĝon: -Bonege! Mi tiom antaŭĝojas aĉeti tiun belan aŭton kiun ni rigardis plurfoje.

Ĝon: -Ĉu ni taksu al la banko?


Lana: -Ne, estus multe pli agrable bicikli. Mi ŝatas bicikli, aparte kiam estas bela vetero.

Ĝon: -Bone, se vi insistas..

Ĝon: -Kaj jes, mi volis diri ke fine de la sonĝo "nia" bela aŭto transformiĝis en blankan rozon. Tre strange, ĉu ne?

Lana: -Ja ja, vi kaj viaj strangaj sonĝoj.





Lana kaj Ĝon ekbiciklas. La suno brilas kaj apenaŭ blovas. Ili ambaŭ ĝuas la bicikladon.



Bum! Subite unu el la pneŭoj de la biciklo de Lana krevis.

Ĝon: -Ho ve, kia bruo! Mi preskaŭ falis de mia biciklo.

Lana: -Jes, vere timigis min tiu laŭtega sono.



Ĝon: -Kion fari nun?

Lana: -Mi proponas lasi la biciklojn ĉi tie kaj promeni al la banko.

Ĝon: -Bone, mi konsentas. Alian tagon ni venigu la biciklojn hejmen, per nia nova aŭto!



Ĝon: -Jam dum tridek minutoj ni promenas.. Iom lacigas min la promenado.

Lana: -Jes, ankaŭ mi lacas, miaj kruroj tre laciĝis. Ĉu ni tamen busu? La vojo montriĝis multe pli longa ol mi imagis.

Ĝon: -Estus bonege! Mi revas pri tio jam dum longa tempo!

Lana: -Jen tie estas haltejo de buso taŭga por ni.



Ĝon: -Dank' al Dio ke ekzistas busoj kaj aŭtoj. Miaj piedoj tiom doloris.

Lana: -Eble ĉar vi ne uzas ilin sufiĉe multe?

Ĝon: -Kio? Mi ne komprenas kion vi celas! Ĉiu-vespere mi uzas ilin tre aktive.

Lana: -Nu jes, por ŝanĝi televidan kanalon...

Ĝon: -Estas fakte bonega ekzerco por la piedoj.



Lana kaj Ĝon finfine alvenas, iom lacaj sed feliĉaj, kaj iras en la bankon. Tie estas multe da homoj kaj longegaj vicoj.

Parto 3 - Rabistoj



Subite enkuras du viroj kaj unu virino. "Ili havas amuzajn ĉapelojn", komentas Ĝon. "Ne estas ĉapeloj, estas maskoj!" diras Lana surprizite.



"Ĉiuj surplanken!" kriegas unu el la viroj. Samtempe li kaj la virino elprenas pafilojn kaj tenas ilin supre por ke ĉiuj vidu ilin. Denove oni aŭdas "Ĉiuj surplanken! Tuj!" kaj la tri maskuloj komencas puŝi homojn malsupren.




Tuj ekestis tre malagraba etoso en la banko. Ĉiuj tre timas, verŝajne ankaŭ la rabistoj. Lana kaj Ĝon kuŝas sur la ŝtonplanko, same kiel ĉiuj aliaj. "Feliĉe la planko estas tre pura", flustras Ĝon. "Estu silenta!", diras la rabistino per streĉita voĉo.



Unu el la rabistoj tuŝas bankiston per sia piedo kaj laŭte ordonas: "Vi, ekstaru!". La bankisto tuj obeas la ordonon, kvankam lia vizaĝo estas tute blanka pro timo.



"Plenigu ĉi tiun sakon per monbiletoj", daŭrigas la rabisto donante grandan sakon. Mirinde rapide kaj lerte la bankisto faras laŭ la postulo de la rabisto, kvankam liaj manoj tre tremas.



Kiam la rabistoj preskaŭ estas pretaj forlasi la bankon eksonoras terura alarmo. La tri maskuloj eknervozigigas kaj dum momento ne certas kion fari. Laŭplane tio ĉi devus ne okazi!



En paniko la plej granda viro prenas brakon de knabino kiu kuŝis surplanke apud li kaj devigas ŝin stariĝi. "Se neniu malŝaltos la alarmon tuj ni prenos la knabinon kun ni!", krias la virino.

La bankisto balbulte klarigas ke ne eblas malŝalti la



alarmon sen aparta ŝlosilo kaj ke tiun ŝlosilon havas nur la polico. "Damne, do ni foriru kun la knabino.", reagas la kaptanto.



Kiel en malagrabra sonĝo, Lana nun aŭdas la voĉon de sia bonega amiko diri:

- "Ne prenu la knabinon! Prenu min!"

- "Kiel vi volas, stultulo.", komentas la viro kaj samtempe kontrolas ke Ĝon ne havas ion danĝeran en siaj poŝoj.



"Eku ni al la aŭto", krias la virino. Fulmrapide la rabistoj forkuras kun plenplena monsako kaj heroa Ĝon inter si.



"Feliĉe ni baldaŭ ŝanĝos aŭton.", pensas la virino laŭte. Kaj post minuto aŭ du ili eniras malgrandan arbaran vojon. Ĉe la vojrandoj staras aŭto parkita. La ŝoforo haltas tuj antaŭ ĝi. Ĉiuj rapide eliras, kovras la ĵus uzitan aŭton per granda kovrilo kaj eniras la alian aŭton.



Nun la ŝoforo veturigas la aŭton multe pli trankvile kaj singarde. La tri rabistoj sen la maskoj aspektas kiel iuj ajn. Ĝon rimarkas ke ili iom post iom trankviliĝas, nur li estas daŭre ege nervoza. La demando "Kion ili planas fari kun mi?" sonas en la kapo de Ĝon senĉese.



"Enŝaltu la radion, mi petas, eble ili diros ion en la novaĵoj.", petas la ŝoforo. La virino enŝaltas la radion kaj aŭdiĝas: "Ding-dong, jen novaĵoj je la plena horo. Hodiaŭ je la deka horo kaj dek ses minutoj tri maskitaj rabistoj atakis la bankon MiaMono. Ili sukcesis preni ĉirkaŭ dek kvin milionojn da steloj kaj ankoraŭ ne estas kaptitaj. La polico momente ne volas diri ion krom ke ili suspektas ke unu el la rabistoj estas vivdanĝera persono kiu antaŭe atakis bankon kaj eĉ mortigis bankiston."



"Jen benzinejo post tricent metroj, bonus halti por aĉeti benzinon.", proponas la ŝoforo vidante ŝildon apud la vojo. "Bone, mi kaŝos min en la malantaŭo de la aŭto.", diras la tiel nomata vivdanĝera rabisto. "Mi prizorgos la benzinumadon kaj vi du restu kie vi estas!", ordonas la virino.



La ŝoforo: - Kio estas via nomo?

Ĝon: - Ĝon.

La ŝoforo: - Bone, mi estas Viktor. Ĝon, aŭskultu: Vi ne devas timi. Nenio malbona okazos al vi.

Ĝon: - Kiel vi povas diri tion? La du aliaj ja havas pafilon kaj ŝajnas tre agresemaj kelkfoje.

Viktor: - Jes, mi scias. Sed ili promesis al mi ke neniu estos vundita. Tio estis unu el la kondiĉoj por mia kunlaboro.



Post multaj horoj sur diversspecaj vojoj, la aŭto haltas ĉe eta domo. La dometo estas en kamparo kaj Ĝon ne vidas aliajn domojn ĉirkaŭe. "Jen nia kaŝloko", flustras Viktor al Ĝon kiam ili eliras la aŭton. "Ni iom ripozu ĉi tie, morgaŭ atendos nin eĉ pli longa vojaĝo. Ni tri forlasos la landon espereble.", pluklarigas Viktor.

Parto 5 - Konatiĝo



Ĝon provas endormiĝi jam dum du horoj, sed tute ne sukcesas. Kutime li endormiĝas tuj enlitiĝinte kaj poste nenio povas vekti lin, sed nun li pensas pri sia amiko Lana kaj la okazaĵoj de la tago. Estis tre stranga tago!



Viktor, la ŝoforo, kuŝas en la sama ĉambro kiel Ĝon, ankaŭ li ne povas dormi.

Viktor: -Ĉu ĉio en ordo?

Ĝon: -Jes... sed malfacilas endormiĝi.

Viktor: -Same por mi. Tro da pensoj cirkulas en la kapo.

Ĝon: -Ĝuste.



Viktor: -Kiel vi fartas post ĉio kio okazis hodiaŭ?

Ĝon: -Nu... mi fartas iom strange.

Viktor: -Mi komprenas, same mi.

Ĝon: -Kaj mi timas kio okazos morgaŭ.

Viktor: -Fakte, ankaŭ mi. Tio ĉi estas tute nova sperto por mi.



Ĝon: -Ĉu? Do, vi ne rabis bankon antaŭe?

Viktor: -Ne, neniam. La aliaj faris plurfoje, sed por mi estis la unua fojo. Kaj nun mi komencas penti ke mi faris tion.



Ĝon: -Sed kial vi nun, kiel plenkreska viro, decidis rabi bankon?

Viktor: -Mi tre ege bezonas multe da mono...

Ĝon: -Preskaŭ ĉiuj bezonas pli da mono, ŝajnas al mi.

Viktor: -Jes, sed por mi vere urĝegas trovi multe da mono.



Ĝon: -Diru al mi, kial ĝuste vi bezonas multe da mono?

Viktor: -Jes, mi diros al vi. Estas treege trista afero por mi kaj ankaŭ vere stultega.

Ĝon: -Nome, kio?

Viktor: -Estas tiel ke mia plej juna infano malsaniĝis kaj nun bezonas specialan operacion en hospitalo.

Ĝon: -Kompatinda... Mi tre bedaŭras.



Ĝon: -Ĉu estas knabo aŭ knabino?

Viktor: -Knabino, kvin-jara.

Ĝon: -Mi vere esperas ke via filino baldaŭ resaniĝos!

Viktor: -Sen multe da mono, ne estas espero por ŝi...

Ĝon: -Sed, kiel rilatas mono al la resaniĝo de via knabino?

Viktor: -Tio estas la vere stultega afero. Vidu, en mia lando kostas multe da mono esti en hospitalo kaj trairi operacion.



Ĝon: -Ho.. mi komprenas, sen multe da mono vi ne povos savi vian filineton.

Viktor: -Ĝuste.

Ĝon: -Aj aj, kia malfacila situacio! Foje la vivo povas esti terure malagrabla.

Viktor: -Pri tio vi certe pravas. Mia koro tiom doloregas kiam mi pensas pri mia knabino kaj mia edzino kiu konstante flegas ŝin.



Ili ambaŭ silentiĝas kaj provas denove endormiĝi. Ĝon decidas preĝi por Viktor kaj lia filino. Li ne estas tre religema kaj ne certas ĉu preĝado helpas. Tamen li opinias ke ne povas malhelpi preĝi pri helpo en malfacilaj situacioj...

Parto 6 - Ne pafu!



- "Vekiĝu, vekigiu! Ni devas tuj eki!", krias la granda viro.

- "Kial tuj? Estas ja nur iom post la kvina", respondos la nova amiko de Ĝon.

- "Ĉar la polico baldaŭ aperos ĉi tie!", klarigas la virino kurante en alian ĉambron.

- "Kiel vi povas scii tion?", scivolas Ĝon.

- "Se mi estus vi, mi simple sekvus kion ni diras sen stultaj demandoj!", minacas la granda viro.



- "Li havas grandan polictimon.", flustras Viktor al Ĝon kaj prenas sian jakon.

- "Ŝajnas tiel. Verŝajne mi ankaŭ havus tion se mi estus rabinta bankon!", respondas Ĝon.

- "Jes kaj krome li antaŭ multaj jaroj mortigis policiston dum alia fuĝo.", Viktor pluklarigas.

- "Ho, nun mi pli bone komprenas lian timon.", diras Ĝon.



- "Eku, eku! Ni jam atendas vin!", hastigas la virino.

- "Bone, ni pretas.", reagas Viktor.

- "Hej, ne krii! La polico eble aŭdos vin.", primokas Ĝon.

Bum! La virino batas Ĝon sur la kapon per sia manplato. "Mi devus lerni ne primoki homojn kiam ili estas nervozaj kaj timigataj!", pensas Ĝon por si mem.



Kiam Ĝon malfermas pordon de la aŭto li subite aŭdas voĉon el megafono: "Ne moviĝu! Estas la polico.". Kaj post kelkaj sekundoj: "Ĉiuj kuŝiĝu! Surgrunden kun la vizaĝo malsupren!".

"Unue ni ne moviĝu kaj nun ni tamen moviĝu.", miras la kvar.



- "Damne! Mi ne povas kredi ke ili trovis nin! Kie ili estas?", diras la virino.

- "Mi vidis du sur la altaĵo, ambaŭ kun pafiloj.", respondas Viktor.

- "Ne pafu!", provas la virino krii, sed ŝia voĉo ne bone funkcias.

"Mi ripetas: ĉiuj surgrunden kun la vizaĝo malsupren!", aŭdiĝas de la megafono. Ĝon komencas kuŝiĝi malrapide.



Kiam Ĝon preskaŭ kuŝiĝis li aŭdas ke la aŭto startas. La granda viro ŝajne ne volas obeii la policon, kiel la aliaj tri. Tuj aperas terura bruego, la policistoj sur la altaĵo komencis pafi la aŭton. Ĉu por mortigi la viron aŭ por detru la pneŭojn, malklaras. Ĉio okazas tre rapide.



La aŭto iras malantaŭen kelkajn metrojn, sed poste haltas, verŝajne la pneŭoj rompiĝis. Dum momento regas silento. "Bonege!", pensas Ĝon zorgante pri siaj sentiĝemaj oreloj. Sed la silento ne restas longe, ĉar la granda viro komencas repafi!



"Stultulo, kial vi ne rezignas?!", krias la virino, sed neniu aŭdas pro la intensa pafado. La granda viro ne plu pensas racie, li nur scias ke li absolute ne volas reveni al aĉa malliberejo kie li tre malbone fartas. Do, li ne scias kion fari krom pafi kaj pafi por sia libereco.



La policistoj ne havis elekton, ili devis finfine mortpafi la grandan viron. Kun krio plena je angoro li falis malantaŭen kaj nun ne plu moviĝas. La virino kiu tre amis la grandan viron kuras al li plorante. "Ho, kara, mi amas vin!", ŝi flustras brakumante lin kun larmoplenaj okuloj.



Subite estas policistoj ĉie ĉirkaŭe. Ili sufiĉe kruelece agas, krias malbelajn vortojn kaj perforte metas mankatenojn sur la virino, Viktor kaj ankaŭ sur Ĝon. "Ej, mi ne estas rabisto!", protestas Ĝon. Tio ne helpas, male la policisto eĉ pli forte metas la mankatenojn ĉe Ĝon kaj poste batas lin sufiĉe forte en la stomakon. "En la hodiaŭa mondo, eĉ ne eblas fidi policiston.", vespiras nia kaptito.

Parto 7 - Ĉu vere?



(Du tagojn poste.)

Lana: - Mi tiom ĝojas ke vi denove estas hejme!

Ĝon: - Jes, vi diris tion jam mil-foje nun...

Lana: - Pardonu, sed mi vere sentas tion. Tamen, vi ne ŝajnas tre ĝoja.

Ĝon: - Ankaŭ mi pardonpetas, sed mi simple ne povas ĉesi pensi pri Viktor kaj lia malsana filineto.

Lana: Ĉu vi aŭdis ion novan pri ili?

Ĝon: - Ne, la telefonisto de la malliberejo diras ke mi ne rajtas paroli kun li telefone.



Lana: Ni ja povus iri tien por viziti lin, se vi volas.

Ĝon: - Mi ne scias, estas longega vojaĝo kaj ni daŭre ne havas aŭton...

Lana: Nu, ekzistas busoj kaj trajnoj, ili daŭre funkcias, malgraŭ tio ke vi ne volas iri ien ajn sola.

Ĝon: - Simple mi daŭre estas iom ŝokita kaj bezonas esti apud amiko. Ĉu vi vere volus iri kun mi tien hodiaŭ?

Lana: Jes, kompreneble, se tre gravas por vi, mi kuniros!



Ĝon: - Bonege, mi tuj pretiĝos por la vojaĝo.

Ĝon: - Agrablas trajnumi, ĉu ne? Iom trankviligas min kaj mi pensas pli klare nun.

Lana: Tre bone. Jes, ankaŭ mi ŝatas trajne vojaĝi. Pri kio vi pensas?

Ĝon: - Daŭre pri la familio de Viktor kaj kiel ni povus helpi al ili.

Lana: Se mi ĝuste konas vin, vi jam havas planon pri tio...

Ĝon: - Nu, jes, estas unu ebleco. Sed ĉu vi akceptus tion?

Lana: Mi volas unue renkonti Viktor kaj aŭdi kiel nun statas pri ĉio.

Ĝon: - Saĝa vi estas.

Lana kaj Ĝon finfine alvenas al malliberejo, post longa



vojaĝo per trajno kaj buso. La sekurkontrolado en la malliberejo estas treege rigora. Estante malantaŭ la altaj kaj grizaj muregoj, la du amikoj sentas malagrablajn kaj Ĝon eĉ pli angoras ol antaŭe. "Hu, ĉi tie mi ne volus vivi dum multaj tagoj", laŭtpensas Lana.



"Atendu en tiu ĉi ĉambro kaj mi venigos la malliberulon.", diras unu el la gardistoj per basa voĉo. Post kelkaj minutoj la pordo malfermiĝas kaj eniras du gardistoj kun mizerega viro inter si. "Tiu devas esti Viktor.", pensas Lana kaj glutas sian maĉgumon senvole. "Vi havas dek minutojn.", grumblas sinjoro gardisto.



Viktor sidiĝas vid-al-vide al Lana kaj Ĝon ĉe la granda tablo kiu staras meze de la ĉambro. "Viktor, kara, kiel vi? Ĉu io nova pri via filino?", nerveze malpacienas Ĝon. Viktor dum momento rigardas ilin du tre serioze kaj poste ekploras, komence mallaŭte, sed iom post iom pli kaj pli maltrankvile kaj laŭte. Ĝon kaj Lana ne scias kion fari, sed iliaj rigardoj renkontiĝas kaj Lana tre malrapide kapjesas al Ĝon kiu tuj komprenas kion signifas.



Ĝon: - Viktor, aŭskultu, mi petas!

(Viktor pluploras, sed iom pli trankvile.)

Lana: - Mi estas bona amiko de Ĝon kaj li rakontis al mi pri via malfacilega situacio. Ni volas helpi al via fileto, se vi permesas.

Ĝon: - Ĝuste, ni vere estas tuŝitaj de via treege malagrabla problemo kaj ŝatus ion fari por vi.

Viktor: - Mi dankas pro viaj afablaj intencoj, sed mi ne vidas kiel vi povus helpi al mia familio.

Lana: - Ni havas sufiĉe multe da mono, kiun ni ne vere



bezonas por ni mem.

Ĝon: - Jes, ni planis aĉeti aŭton per ĝi, sed nun ni preferus uzi ĝin por helpi al via knabino.

Viktor: Sed... Ĉu vere?!

Lana: Nur donu al ni telefonnumeron per kiu ni povos kontakti vian edzinon.

Viktor: Ni ne plu havas telefonon, sed vi povos voki nian najbaron kaj li iros al mia loĝejo.

Ĝon: - Tre bone. Diru la numeron kaj ni tuj provos atingi vian najbaron.



(En la loĝejo de Viktor)

La edzino de Viktor: - Kion vi diris? Bonvolu ripeti, mi nenion komprenis.

La najbaro: - Do, telefonis iu Ĝon dirante ke li estas nova amiko de Viktor kaj ke li volas pagi por la operacio de via filino. Mi helpis lin kontakti la hospitalon. Se mi ĝuste komprenas, la hospitalo nun atendas vian filinon!

La edzino: - Mi ne scias kion diri.. Sonas tro bone...

La najbaro: - Jes, kara, mi konsentas. Sed ne ploru nun mi petas, ne estas tempo, ni devas tuj voki ambulancan!



(Kvin horojn poste.)

Lana: - Hej, vi dormemulo, vekigu! Via telefono sonoras.

Ĝon: - Saluton. Jes, Ĝon ĉi tie. Bone, ĉu? ... Ho, koran dankon pro la informo! Do, la knabino vere estos en ordo, ĉu? Jes, jes, mi komprenas. Dankegon denove, ĝis!

Lana: - Kio? Kio? Diru, kion vi eksciis?

Ĝon: - HUUUUUU raaaaaa!!!!!! La filineto de Viktor sukcese trairis la operacion, post kelkaj tagoj ŝi plej verŝajne estos tute en ordo!

Lana: Ho, kiom agrable aŭdi. Ni devas tuj informi al Viktor.

Parto 8 - Rozo



(Kelkajn semajnojn post la granda aventuro.)

Lana: - Ĝon, vidu kio alvenis ĉi-matene.

Ĝon: - Kio estas tio?

Lana: - Aspektas kiel blanka rozo, ĉu ne?

Ĝon: - Jes, jes, sendube estas rozo blanka. Sed de kie vi havas ĝin?

Lana: - Aperis virino de iu florfirmao ĉe nia pordo kaj petis al mi transdoni ĝin al vi.

Ĝon: - Kial al mi?

Lana: - Mi tute ne scias, ŝi simple diris "Jen floro por Ĝon. Bonvolu subskribi ĉi tie."

Ĝon: - Strange... De ie mi rekonas tiun blankan rozon.

Lana: - Nu, blankaj rozoj ja abundas. Sed kiu sendis ĝin? Tio pli interesas min.



Ĝon: - Vidu estas alkrōĉita koverto. Ĉu mi malfermu ĝin?

Lana: - Tion mi atendas la tutan matenon!

Ĝon rapide malfermas la koverton, elprenas karteton kaj laŭtlegas:

"Karaj Ĝon kaj Lana, mi ne scias kiel danki vin. Mia filino jam bone fartas, tio treege feliĉigas min! Dum kvin jaroj mi devas resti ĉi tie. Bonvolu iam skribi al mi. Elkore kaj dankege, Viktor"